

Ho, kia am-renkonto

WIE SOLL ICH DICH EMPFANGEN

1. Ho, ki - a am - ren - kon - to
De - zir' de l' tu - ta mon - do,
kun Vi en kor - in - tim'!
or - na - mo de l' a - nim'!
Je - su - o, ho Je - su - o,
Vi mem lu - mi - gu min
per - tor - çe. Vi - a lu - mo
al mi ko - ni - gu Vin.

2. Svingante verdajn palmojn
Cion' altigas Vin.
Kaj mi kantante psalmojn
en Vi edifas min,
ke verdu mia koro
en daŭra laŭd' al Vi,
belsonu Via gloro
laŭ mia pov' kaj sci'.
3. Dum korpe kaj anime
mi sidis en sufer',
Vi helpis min senlime:
konsolo, ĝoj', esper'.
Dum for de Vi mi svenis
sen ĝuo, pac' kaj rav',
al mi, Jesu', Vi venis
kun ĝoj', liber' kaj sav'.

4. Min mia pek' katenis,
Vi liberigas min.
 Min malhonor' depremis,
 Vi re-grandigas min.
Vi venas, min honori.
Abundas Via bon'.
Ne povas ĝin devori
tine', rust' aŭ latron'.
5. Nenio Vin instigis,
ke venis Vi al ter',
 kaj pri ĉiel' rezignis
 por vivi en mizer',
nenio, ja nenio
ol Via am' al mi,
la ama am' de l' Dio
liganta Sin al ni.
6. Malgajaj, tristaj koroj,
la jenon sciu vi:
 En zorgoj kaj doloroj
 vin ĉiam helpos Li.
Konsolo via staras
jam antaŭ via pord',
kuraĝaj Li vin faras
per Sia Dia fort'.
7. Vi per tag-nokta peno
ne alvenigos Lin.
 Per braka tir' aŭ treno
 vi ne devigos Lin.
Li venos en libero
kun plena ĝu' kaj am',
vin levos el mizero
de Li sciita jam.
8. Vin via peko premos:
ĝi ne deprimu vin.
 Jesuo ĝin forprenos.
 Senlime fidu Lin.
Li venos, Konsolanto,
Li, Amo kaj Favor',
vin faros heredanto
de l' Dia sav' kaj glor'.


9. Ne zorgu pro la bruo
de l' malamika hord';
dispelos ĝin Jesuo
per ununura vort'.
Alvenos Li, la Reĝo
de l' Dia imperi'.
Atakoj aŭ sieĝo
disfalos antaŭ Li.
10. Por malbenant' malbeno
Vi estos, ho Juĝant',
al ama kor' ben-pleno
kaj dolĉa lum', Savant'.
Ho, venu Vi, alvenu,
ho Sun' el Dia hel'.
Nin el malĝojo prenu
al ĝojo en ĉiel'.

WIE SOLL ICH DICH EMPFANGEN • EG 11 • EM 147 • M (Wie soll ich dich empfangen): Johann Crüger 1653 • germana T: Paul Gerhardt 1653, RG 367, kp. LH 80 • *O LORD, HOW SHALL I MEET YOU • LBW 23 • angla T: laŭ The Lutheran Hymnal 1941 • E: Albrecht Kronenberger 1a kaj 10a strofoj 2007, 4a strofo 2010, 2a kaj 3a strofoj 2012, 5a ĝis 9a strofoj 2013

kun alia melodio:

Ho, kia am-renkonto

WIE SOLL ICH DICH EMPFANGEN



1. Ho, ki - a am-ren-kon - to kun Vi en kor-in-tim'!
De - zir' de l' tu - ta mon-do, or - na-mo de l' a-nim'!



Je - su-o, ho Je - su-o, Vi mem lu-mi - gu min



per - tor-çe. Vi - a lu-mo al mi ko - ni-gu Vin.

2. Svingante verdajn palmojn Cion' altigas Vin.
Kaj mi kantante psalmojn en Vi edifas min,
ke verdu mia koro en daŭra laŭd' al Vi,
belsonu Via gloro laŭ mia pov' kaj sci'.
3. Dum korpe kaj anime mi sidis en sufer',
Vi helpis min senlime: konsolo, ĝoj', esper'.
Dum for de Vi mi svenis sen ĝuo, pac' kaj rav',
al mi, Jesu', Vi venis kun ĝoj', liber' kaj sav'.
4. Min mia pek' katenis, Vi liberigas min.
Min malhonor' depremis, Vi re-grandigas min.
Vi venas, min honori. Abundas Via bon'.
Ne povas ĝin devori tine', rust' aŭ latron'.

5. Nenio Vin instigis, ke venis Vi al ter',
kaj pri ĉiel' rezignis por vivi en mizer',
nenio, ja nenio ol Via am' al mi,
la ama am' de l' Dio liganta Sin al ni.
6. Malgajaj, tristaj koroj, la jenon sciu vi:
En zorgoj kaj doloroj vin ĉiam helpos Li.
Konsolo via staras jam antaŭ via pord',
kuraĝaj Li vin faras per Sia Dia fort'.
7. Vi per tag-nokta peno ne alvenigos Lin.
Per braka tir' aŭ treno vi ne devigos Lin.
Li venos en libero kun plena ĝu' kaj am',
vin levos el mizero de Li sciita jam.
8. Vin via peko premos: ĝi ne deprimu vin.
Jesuo ĝin forprenos. Senlime fidu Lin.
Li venos, Konsolanto, Li, Amo kaj Favor',
vin faros heredanto de l' Dia sav' kaj glor'.
9. Ne zorgu pro la bruo de l' malamika hord';
dispelos ĝin Jesuo per ununura vort'.
Alvenos Li, la Reĝo de l' Dia imperi'.
Atakoj aŭ sieĝo disfalos antaŭ Li.
10. Por malbenant' malbeno Vi estos, ho Juĝant',
al ama kor' ben-pleno kaj dolĉa lum', Savant'.
Ho, venu Vi, alvenu, ho Sun' el Dia hel'.
Nin el malĝojo prenu al ĝojo en ĉiel'.

WIE SOLL ICH DICH EMPFANGEN • RG 367, kp. LH 80 • M (Valet will ich dir geben = St. Theodulph): Melchior Teschner 1614 • germana T: Paul Gerhardt 1653 • EG 11 • EM 147 • *O LORD, HOW SHALL I MEET YOU • LBW 23 • angla T: laŭ The Lutheran Hymnal 1941 • E: Albrecht Kronenberger 1a kaj 10a strofoj 2007, 4a strofo 2010, 2a kaj 3a strofoj 2012, 5a ĝis 9a strofoj 2013